


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

„HOMFRATO, HELPU MIN!” (daŭrigo)

La viroj rakontas al Harro, kiel la patro nevole paŝis sur la serpenton kaj kiel ĝi mordis lian tibiokarnon preskaŭ en la sama momento, kiam li ĝin vidis. Poste ili iras neparolantaj, ĉar la viroj rapide iris la 25-30 km ĝis nia domo, kaj staris nur kelkajn minutojn antaŭ la reiro. La lumo de la lampo ne sufiĉas, ofte la lasta en la vico faletas pro radikoj kaj aliaj malhelpaĵoj.

„Antaŭe estis pli bone. Tie ni purigis la pikadon venante, sed ĉi tie ne plu.”

Ree silento. Krakas nur la branĉetoj sub iliaj piedoj kaj de temp' al tempo ektimigita besto rapidas en la densejon. Ĉiam denove ĉuriano (proñ. kuriango = lurocalis semitorquatus) flugas ĉirkaŭ iliaj kapoj, la noktobirdo, kiu en somera nokto ĉiam flugas ĉirkaŭ migruloj, senbrue ŝvebante tiel proksime, ke ĝi tuŝas ilin per sia forko-forma vosto. La kabokloj ĝin timas, ĉar en ili vivas ankoraŭ la kredo de la indianoj, ke en tiuj birdoj vivas la animoj de la mortintoj. Iam kaj iam sonas melankolia strigohuo el la malhelo, tiaŭ, tiaŭ, aŭ, kaj miloj da fulguroj. Ĉi tie ili estas preskaŭ tiel longa kiel dikfingro kaj lumas multe pli forte ol la lampiroj en Eŭropo. Unufoje la antaŭiranto premas la brakon de Harro kaj montras al sia hundo, kiu sin premas al liaj piedoj kun subtirita vosto kaj hirtigita hararo.

„Pumo devas esti malproksima!”

Ili ekstaras kaj aŭskultegas, sed ili aŭdas nenion. Kiu scias, kiel proksime spione atendas la kato! Nur post iom da tempo la hundo ĉesis montri timon. Tiel ili iras dum horoj. La vestoj pendiĝas en la branĉaro, ili faletas, eĉ falas. Nun venas la „rio pordo” (la pala rivero), la ponto kaj la marĉo. Nun la nokto ne plu estas silenta, ĉar tie bruas centoj da ranoj. Nur malmultaj kvakas kiel iliaj eŭropaj kuzoj, multaj krias: pong, pong, tong, laŭte kaj malagrable, kiel batoj kontraŭ metalo; aliaj fajfas akre kiel ludil-fajfiloj je kermeso, kaj aliaj plorpetas kiel ploretantaj beboj. Nun necesas bone atenti, ĉar en multaj lokoj estas senfunde.

La viroj bruligas la torĉon kaj la antaŭiranto tenas la lampon proksime ĉe la piedoj de Harro. Sub iliaj paŝoj klakas la akvumita tero, ambaŭflanke altaj marĉoherboj. Poste ree supren. Arbaro. Kaj fine la lasta deklivo malsupren.

„Tie”, oni diras kaj montras al malforta fajrolumo, kiu venas el kabano.

„Kiel fartas la patro?”

„Li mortos”, respondas virino, kiu leviĝas de la tero apud la forno. La malsanulo parolas senkonscie, la kruro estas ŝvelinta kaj iom blua. Klare oni vidas la du malgrandajn punktojn de la mordo, per kiu la mortiga veneno enpenetris en la korpon.

„Mi ne scias”, respondas Harro al la senvorta demando de la filo, „ĉu restas ankoraŭ espero.”

Eĉ ne unu minuto da ripozo. Li postulas bolantan akvon por steriligi la inektilon. Tuj la fajro alten ekflamas. Per akra sono rompiĝas la kolo de la ampulo kaj li suprensuĉas tra la pikilo la savantan serumon. Sed la malsanulo rifuzas la helpon. Li batas al Harro. Fine du viroj devas teni lin. Baldaŭ post la injekto li trankviliĝas kaj ekdormas.

„Tio estas bona signo”!

Vere, tie antaŭ la sanktulujo pendas la granda ĵararako kun la larĝa kapo fermita kiel tolaĵglatigilo malsupren kaj sur kaj ĉirkaŭ la kuŝejo la plej diversaj herboj kaj radikoj, kies sorĉoforton ili provis. Harro rakontas al la ĉeestantoj, kio estas la serumo kaj kial ĝi helpas kaj kial estas necese injekti ĝin baldaŭege.

„Ĉu la sinjoro ne deziras brandon aŭ manĝi ion?”

„Ne! Nur ripozi, dormi. Post tri horoj vi nepre veku min, por ke mi ripetu la injekton!”

Post tri horoj jam longe fagiĝis. La malsanulo dormis preskaŭ la tutan tempon, sed la piedo estas ankoraŭ blua. Harro donas duan kaj post pluaj tri horoj trian injekton. Sed nun oni klare vidas la

pliboniĝon. La terura ŝvelaĵo malplidikiĝis. La serumo venkis. Homa vivo estas savita. Tion sentas ĉiuj, ankaŭ la nun ree bone konscia malsanulo.

„Donu al la sinjoro ĉion!” li diras al sia filo kaj tiu serĉas el kofro malpuran saketon plenan de moneroj: la tuta familia trezoro!

„Ne”, diras Harro, „la serumon mi ricevis senpage de Butantan, ĉar mi sendis tien vivantajn serpentojn. Kaptu serpentojn por ni kaj alportu ilin en kukurbo-ujo, por ke ni ree ricevu serumon por alia akcidento. Kaj ĉar mi hodiaŭ ne povis labori, vi, Benedito, venu al ni kaj helpu nin unu tagon!”

„Certe, certe li venos, kaj kiam mi buĉos porkon, mi alportos al vi la duonon. Kaj Dio pagu al la sinjoro pro tio, kion li faris por mi!”

La virino estas buĉinta kokon kaj li devas manĝi antaŭ ol li reiros hejmen. Nur malfrue en la sankta vespero Harro revenas.

Benedito ne venis labori same kiel aliaj, de kiuj ni petis tion, kaj la duonan porkon ni ankaŭ neniam vidos. Ĉi tiu infaneca popolo ja ĉiam promesas la bluan de la ĉielo kaj plenumas nenion. Jam ofte ni decidis, ke ni ne plu helpu, sed tamen ni tion faros ĉiam denove, se iu venos, ĉar estas deviga forto en la voko: „Hom-frato, helpu min!”

Erika Linz, Caraguatatubo, Estado de Sao Paŭlo, Brazilo.

Rimarko: Harro lernis Esperanton kiel trijarulo.

IAM MI TRAVIVIS TRE EMBARASAN SPERTON.....

(Responde al „Propono” en n-roj 136-137).

Tio okazis antaŭ multaj jaroj. Tiam mi estis dek-kvinjara junulo. (Nun, jam multajn jarojn, kelkaj blankaj haroj ornamas mian kapon). Mi vojaĝis al mia naskiĝa vilaĝo en la nordo de nia insulo, kie en tiu tempo ne ekzistis (kaj hodiaŭ ne ekzistas) tiuj iloj de la civilizo, kiujn oni nomas aŭtovojoj, elektra lumo, telefono, gazetoj.


En tiu loko mi ofte aŭdis pri reveno de animoj de mortintoj el transmondo; pri sorĉistinoj, kiuj forrabis infanojn kaj suĉis ilian sangon; pri vagantaj lumoj, kies signifon oni ne povis klarigi; pri misteraj bruoj kaj transmondaj vortoj kaj veoj..... Mia infana animo pleniĝis de tiuj superstiĉoj, kies naturo tiam tute ne estis klara al mi. Mi vagis en la regiono de la kono, kie oni jam ekdubas, sed ankoraŭ oni ne tute forĵetis la teruraĵojn, kiujn mal-kleraj kamparanoj semas en molan infancerbon.

Mi jam studis por fariĝi popollerneja instruisto. En iu agrabla somero mi iris tien. La unuan nokton mi por dormi iris, tute sola, al malnova domo, kie, laŭ famoj, oni aŭdis misterajn bruojn kaj vidis strangajn lumojn. La nokto estis varmeta. Ekstere regis la lumo de la plena luno. Mi kuŝis sendorma sur la lito, kun la vizaĝo turnita al la plafono. Hazarde miaj pensoj iris al la famoj pri tiu domo, kiujn mi aŭdis en mia frua infanaĝo. Mi pripensis, kio okazus, se subite estiĝus tiuj bruoj aŭ enigmaj lumoj. Mi preskaŭ dormis, kiam mi aŭdis, nete kaj precize, en la interno de la ĉambro, du, tri frapojn. La dormemo forflugis de mi. Sed mi ne movis min, mi ne kuraĝis eĉ malfermi la okulojn. Mi aŭskultis streĉe. Ree mi aŭdis klare, nedubeble, du, tri frapojn. Ektimo kaptis min, ektimo, kian mi neniam poste en mia vivo spertis tiom ega. Ĉu eble tiuj onidiroj pri bruoj, lumoj, fantomoj tamen estus veraj? Ree sonis la frapoj. Mi ekŝvitis; baldaŭ mia korpo estis kovrita de malvarma ŝvito. Kaj ree la bruetoj En prema angoro mi kuraĝis malfermi la okulojn kaj turni min sur la lito en la direkto, de kie venis la frapoj. Tiam mi preskaŭ svenis: en la mallumo de la ĉambro movis sin en angulo du klaraj, lumaj punktoj. Mi ne sciis kion fari, kion diri, kiel eliri el tiu premega embaraso. Kaj ree mi aŭdis la frapojn, dum la du lumetoj sin movis kaj malaperis.

Subite mi komprenis la tuton. Temis pri maljuna kato, kies oreloj estis malsanaj pro skabio. Ĝi kaŝe eniris la ĉambron kaj mi ne vidis ĝin, kiam mi estingis la kenan torĉon, kiun mi kunportis por la enlitiĝo. Kaj tra la malfermaĵoj de la senmorteraj muroj kaj truoj de la kadukaj lignopordoj eniris sufiĉe da luna lumo, por ke la okuloj de la kato brilu, kiam ĝi mallevis sian kapon. Per siaj antaŭaj piedoj ĝi penis forgrati la jukan malsanon de sur siaj oreloj kaj tiam frape tuŝis lignan keston, sur kiu ĝi sidis.

Se dume la kato estus foririnta sen mia konstato, certe ankaŭ mi poste estus jesinta, ke mi foje aŭdis misterajn bruojn kaj vidis strangajn lumojn. Sed nun la okazo renversis mian kredon al transmondaj aĵoj. De tiam mi komencis kompreni ke ĉio, kio ŝajnas supernatura, estas nur tio, kion ni ne konas. Eble pro tio mi poste fariĝis tute skeptika pri transmondo. Kelkfoje mi tion bedaŭris, ĉar tial mi ja perdis definitive la ŝancon iam povi vidi feon, elfon, gnomon..... Kaj homo, kiu neniam povis vidi koboldon, al multaj ŝajnas malfeliĉulo.

J. Régulo Pérez, Kanariaj Insuloj.



IJK-Rubriko. Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veen-
dam, Nederl. — Centra Informejo de IJK: Einar
Dahl, Uddevalla.

Sugestita konstitucio de Internacia Instruista Asocio.

(Ĉi tiu konstitucio jam estas akceptita sen diskutado dum la jara KUNVENO de S.B.E.T.¹⁾ ĉar oni konstatas, ke estas necese, ke internacia komitato diskutu ĝin).

- 1) La nomo de la internacia instruista organizaĵo estu: **INTERNACIA LIGO de ESPERANTISTAJ GEINSTRUISTOJ.**
- 2) La celoj de la LIGO estu:
 - 1) Kunlaborado inter geinstruistoj por enkonduki Esperanton en lernejojn ĉiuspecajn,
 - 2) Kunlaborado inter geinstruistoj por ebligi la praktikon de Esperanto inter gelernejoj kaj geinstruistoj per korespondado kaj vizitoj,
- 3) Kunlaborado inter geinstruistoj per Esperanto rilate ĉiujn pedagogiajn aferojn.
- 3) La LIGO estu bazita je landaj asocioj (aŭ sekcioj) de Esperantistaj geinstruistoj, kiuj havu siajn proprajn regularojn, kaj kiuj funkcias pere de jara kunveno de la anoj, al kiuj la estraro de ili elektita estas respondeca.
- 4) La LIGO estu gvidata de KOMITATO, konsistanta el po unu reprezentanto de ĉiu membra asocio (sekcio) elektita alcele de la membra asocio, aŭ dum la jara kunveno aŭ laŭ la bontrovo de la anoj de la membra asocio. Ĉi tiuj reprezentantoj havas la devon prezenti la opiniojn de siaj asocioj kaj raporti al siaj anoj la farojn de la KOMITATO de la LIGO. Ili ankaŭ havas la devon informiĝi pri la situacio en siaj landoj rilate esperanton en la lerneja kaj eduka mondo kaj raporti tion al la Sekretario de la LIGO. La komitato kunvenu unufojon jare por gvidi la ĝeneralajn aferojn de la LIGO.
- 5) La KOMITATO elektu estraron, kiu dum la jaro funkciigu la LIGON. La estraro konsistu el Prezidanto, Sekretario-Kasisto, kaj 3 konsilantoj. La Prezidanto kaj Konsilantoj estu elektitaj por trijara periodo kaj estu tiam reelekteblaj. La Sekretario-Kasisto estu elektita sen limdato, sed estu aprobita de la KOMITATO ĉiujare.
La Prezidanto devas prezidi la komitatan kunvenon kaj aliajn kunvenojn de la LIGO laŭeble. La Sekretario-Kasisto devas esti la protokolisto de la Komitata Kunveno kaj efektiviĝi la decidiĝojn de la komitato; gvidi Centran Informejon per kiu li ricevu kaj konservu informojn por kaj pri la LIGO; fari la necesan agadon rilate la enregistron de membraj asocioj kun iliaj reprezentantoj; konsiliĝi kun la Prezidanto kaj la 3 konsilantoj pri aferoj de la LIGO eksterrutinaj.
La Konsilantoj estas respondecaj kun la Prezidanto kaj la Sekretario pri la agado de la Ligo inter la jaraj kunvenoj de la Komitato kaj devas havi informojn pri tiaj aferoj por ke ili konsilu kaj aprobu. Se iu afero

¹⁾ Asocio de britaj gekolegoj-esperantistoj.

urĝas, tiam la Sekretario konsiliĝu nur kun la Prezidanto, sed informu la Konsilantojn poste.

- 6) En landoj, kie ne ekzistas instruista asocio (sekcio), la Estraro aprobu reprezentanton de la Ligo, kies devo estas informiĝi pri la situacio rilate Esperanton en la lernejoj kaj edukaj rondoj, raporti pri tio al la Sekretario de la Ligo, kunligi ĝeinstruistojn en ties lando kaj laŭeble formi instruistan asocion, kiu iĝu membra asocio (sekcio) de la LIGO. Izolaj ĝeinstruistoj. Ĉiu instruisto(ino) estu kunlaboranto en la Ligo se li (ŝi) registras sin ĉe la Centra Oficejo. La Sekretario de la Ligo laŭeble informu tiajn ĝeinstruistojn pri aliaj gekolegoj en la sama lando.
- 7) INFORMILO. Ĝis kiam venas la tempo, kiam la LIGO povas starigi sian propran informilon, la gazeto „Juna Vivo” estas la oficiala informilo de la LIGO. Estas necese, ke ĉiu oficisto, komitatano kaj reprezentanto de la LIGO abonu ĝin.
- 8) FINANCA BAZO. Post tri jaroj (ek de 1949) la Komitato rekomendu financan planon laŭ kiu la LIGO funkciu. Intertempe ĉiu membra asocio pripensu la eblecon subteni la LIGON ĉu per procentaĵo de la tuta financa enspezo ĉu per malgranda pago laŭ membro.
- 9) La LIGO estu kunlaboranta Asocio kun U.E.A.

Noto de la red.: Ni scivolas pri la opinioj de niaj gekolegoj diverslandaj, sed ni petas vin koncize formuli viajn opiniojn.

- Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado”.

(C. Krusemanstr. 43, Amsterdam-Z.).

Laŭ ricevataj informoj, kies kompletecon mi bedaŭrinde ne povas garantii, Esperanto estas instruata en Nederlando dum la lerneja jaro 1948-1949 en 23 (27) lokoj en 31 (32) diversaj lernejoj. El la lastaj estas 16 publikaj, 5 katolikaj, 4 protestantaj, 1 neŭtrala; kröme 3 porinstruistaj seminarioj regnaj, 1 mezgrada ĝardenkultura lernejo regna kaj katolika blindulinstituto. La instruo okazas preskaŭ ĉie post la ordinaraj horoj, nur esceptokaze ĝi estas oficiala kaj deviga. Ĝi estas donata de profesiaj ĝeinstruistoj, nur en unu loko de neprofesiulo. Jen diferenco kun la jaro 1938-1939, kiam ofte neprofesiuloj instruis Esperanton en kursoj por lernejaj infanoj. (La nombroj interkrampaj rilatas tiun antaŭmilitan jaron).

Entute ricevas nun 269 (138) knabinoj kaj 353 (169) knaboj Esperanto-instruon, do 622 (307) geknaboj. La aĝoj varias inter 10 kaj 20 jaroj.

P. W. Baas, prez.

Internacia Ekspozicio de infanaj desegnaĵoj en Italujo.

Same kiel en Lyon la ekspozicio en Italujo havis grandegan sukceson. En Milano oni starigis la ekspozicion en la „Arta Moderna Galerio”, kiun la Milana urbestro tiucele senpage pretigis. El 3.000 senditaj desegnaĵoj de infanoj (6-15-jaraĝaj), oni elektis 670 ekzemplerojn. La ekspozicio aliris multajn aŭtoritulojn el pedagogiaj, kulturaj kaj artaj rondoj. Post Milano sekvis Parma, kaj poste Venecio. Ĉie la sukceso estis granda, kaj la propagando por Esperanto bonega.

En Septembro la ekspozicio okazos en Amsterdam, kaj poste en aliaj nederlandaj urboj. Tiucele oni ankoraŭ povas sendi verkaĵojn de infanoj al s-ro C. Geurts, Voorhaven 80, Edam.

NIA VERKILO.

Ĉu vi faris bonajn frazojn ĉe la bildoj de „Nia Verkilo” en la antaŭa numero de „La Juna Vivo”?

Nun mi havas 6 novajn bildojn por vi. Sub la unuan bildon mi skribis la frazojn; sub la kvin aliajn vi devas skribi ilin.

Mi demandas: „Kion faras?” kaj „Kia estas?”



1.

Kion faras?

1. Johano trinkas limonadon.
2. En la mano li havas la glason.

Kia estas?

1. Johano estas juna.
2. La glaso estas plena.
3. La limonado estas bona.



2.

Kion faras?


1. Mario
2. En la mano

Kia estas?

1. Mario
2. blanka
3. La haroj



3.

Kion faras?
Kia estas?




4.

Kion faras?
Kia estas?




5.


Kion faras?
Kia estas?



6.



trabojn, do aĉetis ilin en alia urbo. Kelkaj edamanoj iris al tiu urbo por alporti ilin per granda ĉaro. Ili metis la trabojn laŭlarĝe sur la ĉaron kaj veturis al Edam. Sed — kiam ili venis antaŭ la pordego, la veturilo ne povis pasi tra ĝi. La homoj provis kaj provis, sed la ĉaro kun la ligno estis tro larĝa. Kelkaj edamanoj proponis segi la trabojn en pecojn, sed tiam oni ne plu povus uzi ilin. Neniu povis doni konsilon. Sed subite unu el la viroj vidis paseron. Ĝi flugis tra la pordego kun pajlero en la beko. Ne laŭlarĝe, sed laŭlonge. Nun la viroj komprenis, kiel ili agu. Ili malŝarĝis la veturilon kaj denove ŝarĝis ĝin, metante la trabojn laŭlonge sur la ĉaron. Kaj nun ili povis pasi tra la pordego. De post tiu tempo oni nomas la edamanojn laŭlarĝuloj aŭ paseroj.



Lernantoj de la elementa lernejo en Edam, Nederlando.

Enigma: Kial ĝirafo neniam estas sola? (La solvon vi trovos aliloke en ĉi tiu numero).

G. Schaedel, München, Germ.

Logike.

Paĉjo, kial la ĝirafoj havas tiom longajn kolojn?
Ĉar ili nutras sin per la folioj de la arboj.
Kial la folioj kreskas tiom alte?
Tiam la ĝirafoj ne bezonas klini sin!

La Formiko.

La formikoj estas por ni pli malutilaj ol utilaj. Sed ili donas belegajn ekzemplojn al ni! En formikejo regas la sama ordo kiel en la plej orda urbo de homoj. Ĉiu formiko havas sian laboron; li plenumu sian taskon. Kelkaj zorgas, ke la strato restas pura; aliaj zorgas pri la provizoj, aliaj devas defendi la formikejon kontraŭ atakemaj najbaroj. Formikoj de diversaj gentoj militas unu kontraŭ la aliaj. Kiuj loĝas en la sama formikejo helpas unu la alian: jen iu, kiu portas greneron al la loĝejo. Sed ĝi estas laca kaj falas sub la pezo de la ŝarĝo. Tuj alkuras ĝiaj amikoj. Ili helpas ruli la greneron al la komuna restadejo.

Ni imitu tiujn ĉi bestojn laŭ iliaj laboremo kaj ordamo, tamen ne laŭ ilia preskaŭ proverba militemo!

Si preferis la uraganon!

Gepatroj perdis ĉion pro terura uragano. Dum ili serĉis alian loĝejon, ili sendis sian trijaran fileton Tom al onklino.

Post tri tagoj la onklino sendis jenan telegramon: „Mi resendas Tom. Sendu al mi la uraganon!”

L. Ballesteros, Zaragoza, Hispanujo.

Li ne perdis ilin!

Patrino: Peĉjo, vi denove interbatalis kun iu. Vi ja perdis du dentojn!

Peĉjo: Mi ne perdis ilin, panjo! Ili estas en mia poŝo!

Interparolo.

Valerio: Dum kelka tempo mi ne vidis vin, Maŭrino. Ĉu ankaŭ vi suferis pro malvarmumo?

Maŭrino: Jes, la temperaturo estas tro malalta laŭ la sezono. Mia gorĝo ankoraŭ doloras. Tio estas nun duoble malagraba afero, ĉar mi volas ekzerci la kantadon por la kunveno en Versajlo.

- Valerio: Ankaŭ mi intencas lerni parkere kelkajn kantojn, sed al mi tute ne plaĉas fari tion sola. Tamen mi pretigis mian gitaron. Eble mi trovos unu aŭ kelkajn amikojn, kiuj volas studi kun mi.
- M.: Tuj kiam mia voĉo tion permesos, mi kantos kun vi kaj mi invitos ankaŭ Lenjon kaj Georgon al nia klubeto. Ili eble konas kelkajn aliajn, kiuj iros al la Junularkunveno kaj pro tio ek-lernos kelkajn kantojn.
- V.: Se ili ne iros al Parizo, ili tamen povos kanti kun ni. La ekzercado estas agrabla kaj utila. Kantante oni spirite refreŝiĝas kaj korpe plifortiĝas.
- M.: Almenaŭ se oni atentus kelkajn ĉefregulojn de la kantado. Oni tenu la korpon rekta kaj malstreĉu ĉiujn muskolojn. Oni kantu libere kun gaja animo.
- V.: Mi ŝatas akompanon ĉe la kantado por atingi iom da rezultato. Ni ekzercu ĉe piano se eble, kvankam ankaŭ fluto aŭ gitaro estas bonaj akompaniloj.
- M.: Georgo havas akordeonon. Ni invitu lin al nia kantklubeto. Li estas petolema knabo, ĉiam gaja kaj ridema. Niaj kunvenoj estos agrablaj, mi supozas.
- V.: Des pli bone! Ni hejme lernu la tekstojn parkere, la melodiojn ni aŭdos, kiam ni estos kune.
- M.: Almenaŭ ni konu la melodiojn kaj tekstojn de „Marŝkanto de la Junularo” kaj „La Espero”.
- V.: Mi scias ankaŭ aliajn belajn kantojn kaj krome ŝatas la modernajn kantojn, kies tekstoj ankoraŭ ne estas en Esperanto. Lertulo traduku ilin por ni.
- M.: Jes, kaj alia lertulo, ekzemple Kon Walsh, ludu ilin por ni. Sed provizore ni ekzercu la ekzistantajn kantojn el la kantaro de „La Juna Vivo.”
- V.: Kompreneble! Ĝi estu la bazo. Tamen la mondo de la muziko estas pli vasta. Ni esploru ĝin kaj precipe: ni praktiku la kantadon!
- M.: Mi samopinias. Entuziasme ni kantu: „En la mondon venis nova sento!”
- V.: Kaj ĉiuj kantu kun ni!

Pensosporto.

Du knaboj migris tra arbaro. Kiam ili volis manĝi, venis mal-juna sinjoro. Ili invitis lin manĝi kun ili. Petro havis tri pan-tranĉaĵojn kaj Andreo havis du pantranĉaĵojn. Ĉiujn kvin ili dividis en tri partojn, do ili tiam havis 15 pecojn. Ĉiu persono manĝis

kvin pecojn. Poste la maljuna sinjoro diris: „Mi tre dankas vin pro la pano. Ĉi tion mi donacas al vi. Dividu ĝin ĝuste.”

Li donis al la knaboj 5 markojn.¹⁾

Andreo proponis: „Mi ricevos 2 markojn, kaj vi, Petro, prenu 3 markojn. Mi ja donis 2 pantranĉaĵojn kaj vi tri.”

Sed Petro ne konsentis, li postulis 4 markojn.

Kiu estis prava? Bone pripensu tion! En la venonta numero vi legos, kiu pravas.

M. v. Waldowski, Berlin, Germ.

¹⁾ marko estas germana monero.

LUDO (Reĝo kaj reĝino).

Unu el la geludantoj estas reĝo, alia reĝino. Ili alterne elektas al si unu el la ludkamarad(in)oj, ĝis du samnombraj partioj estos formitaj. Ambaŭ staras vice unu kontraŭ la alia. La reĝo donas al siaj kunuloj neparajn numerojn: 1, 3, 5, 7, ktp., la reĝino parajn numerojn: 2, 4, 6, 8, ktp.

Nun la reĝo diras ekz. numeron 5. Tiam devas tiu ĉirkaŭkuri la vicon de la kontraŭpartio (oni rajtas ekkuri de kiu ajn flanko). La reĝino siaflanke tuj ordonas unu el sia kortegano, kriante ekz. numeron 8. Tiu devas postkuri (ne kontraŭkuri!) numeron 5 por bati tiun antaŭ ol tiu atingos sian lokon en la vico. Se li sukcesis bati, numero 5 fariĝas kaptito de numero 8 kaj devas kiel la lasta stari en la vico de la kontraŭpartio kie li ricevas novan numeron. Se oni ne sukcesis frapi, ambaŭ kurintoj staras en siaj lokoj. Nun la reĝino diras numeron kaj tuj poste la reĝo alian, kiu postkuru la unuan k.t.p. La partio, kiu en destinita tempo kaptis la plej multajn, estas la venkinto.

A. Mehtonen, Oulu, Finnlando.

La solvo de la enigmo: Ĉar ĝi ĉiam havas kun si kolegon (kol-eg-on).



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Versailles 3-10 aŭg. '49.

Jen la lastaj informoj antaŭ la granda festo!

Ni ricevis tre bonajn novaĵojn de la Organiza Komitato:

1. Ni loĝos en la „Ecole Normale d'Instituteurs”, 3 rue de

Lesseps, Versailles. Ni tie povos disponi pri litoj, kun po unu kovrilo kaj 2 litotukoj (almenaŭ tiuj, kiuj anoncis sin antaŭ la 1-a de julio). Do bonega aranĝo, kiu grave malgrandigas la pakaĵojn!

2. Ni tre komforte manĝos en la sama lernejo, ĉar ni senpage povos disponi pri teleroj, glaso, forkoj k.t.p. Sed atentu: Oni devos pagi eventuale rompitaĵojn objektojn, ĉar „Kiu rompis la glason, ordigu la kason!” Ĉiu partoprenanto tamen mem kunportu nerompeblan glason por uzi ĝin ĉe la malvarmaj manĝoj ekster la lernejo. Do ne forgesu ĝin!

3. La nutraĵoj estos francmaniere preparitaj kaj tre allogaj.

La franca kuirsocieto ja estas mondfama kaj certe kuriozaĵoj por alilandanoj.

En la lernejo oni povos akiri varman akvon por laŭvole pretigi teon ĉe la matenmanĝo. Estas tre konsilinde, ke ĉiu kunportu iom da sukero, ĉokolado, teo kaj margarino.

Alveno: La gvidantoj de karavanoj kaj grupoj bonvolu antaŭ 30/7 detale informi la organizan komitaton en Versailles (66 rue Albert Joly) pri la alvenhoraro en Parizo aŭ Versailles. Oni mendu fervojan bileton al Versailles R. Droite, tra Paris St. Lazare. Same por la pakaĵa registrado. Vi do venu al Parizo tra la stacio St. Lazare; tamen vi ne eliru en Versailles R.D., sed en la haltejo Montreuil, kiu estas pli proksime al la gastejo, kaj vi trovos tie gvidantojn por konduki vin al la Ecole Normale.

Pri la programo: Venis du etaj ŝanĝoj: La kunsido de I.I.K. okazos ĵaŭdmatine kaj sabatmatene estos liberaj promenadoj, same kiel lundmatene por tiuj, kiuj ne deziras partopreni eventualajn diskutadojn.

Tria listo de partoprenantoj: El **Britujo:** s-ro Edward Tarrington el Wasted; la grupo de s-ro Hamilton (Hemsworth) konsistas el: ges-roj Hamilton, s-ro R. Hamilton, f-ino Barbara Hamilton, f-ino Woodward, f-ino Joan Carter, f-ino Eileen Tate, f-ino Ann Greetham, s-ro Keith Lodge, s-ro Eric Sale, s-ro Sam. Josham, f-ino Edith Mayward, f-ino Mc. Guire, s-ro L. Smith, f-ino Roberts, s-ro W. Greasley. El **Ĉeĥoslovakujo:** s-ro Pavlik Zdenek kaj s-ro Hlaváček Milos. El **Danujo** (Middelfart): ges-roj Christensen, s-ino Petersen, f-ino Löhde, f-ino G. Thomsen, ges-roj Viborg, s-ro Bent Poulsen, f-ino Agnes Jakobsen, s-ro Fr. Poulsen, f-ino Tlindt, f-ino Toftgaard, s-ro Mikkelsen, ges-roj Windeballe, f-ino Hvidt, f-ino Chausen, ges-roj Johansen, s-ro Andersen, s-ro Nielsen, ges-roj Mygind Larsen, s-ro Jensen, ges-roj Jörgensen, s-ro Brodersen, f-ino Kroger. El **Germanujo:** S-ro Dellian Kurt (München). El **Nederlando:** f-ino J. v. Dijk (Sneek), f-ino Rie Bant (Groet). El **Polujo** (Reda k. Gdynia): -ro B. Palczynski.

Ricevitaj donacoj: s-ro R. B. en Carpentras (Franc): 200 fr; s-ro A. en Meknes (Marokko): 500 fr; f-ino K. en Selz (Franc): 150 fr; s-ro Chr. (Dan.): 1500 fr; s-ino Chr. (Dan.): 250 fr; s-ino? P. (Dan.): 200 fr; s-ino L. (Dan.): 250 fr; ges-roj M. L. (Dan.): 500 fr; s-ro W. (Dan.): 1.000 fr; ges-roj Jorgensen (Dan.): 500 fr.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretario A. Schouten, 122, Oosthuizen, Ned.).



Antaŭ la kunveno en Versailles aperos „La Peranto inter la Perantoj”, en kiu diversaj problemoj kaj raportoj estos pritraktataj. Interesatoj petu senpagan ekzemplerojn ĉe T.J.O.-Centro.

Pro la ekziĝo de kelkaj estraranoj, pri kio ni jam raportis, ni petas kandidatojn por novaj estraranoj. La sekretario estos ne-reelektebla. Pro la malsano de s-ro Kryt li preferas fariĝi asesoro kaj la Geurts kiel prezidanton. Pluajn detalojn vi trovos en „La Peranto”.

Dekstre:

Nia dana ĉefperanto: Kaj Peder-sen, Chr. Hansensvej 4, Holbaek.

La foto estas farita dum la UEA-kongreso en Malmö, en 1949, dum li pretigis sian bonvenigan paroladon por la „Junulara Vespero”.

En Nederlando okazos de 19/8-18/9 granda ekspozicio: „Jeugd van Nederland” (Junularo de Nederlando), subtenata de la ned. registaro. En ĝi partoprenos ankaŭ la ned. sekcio de T.J.O. Krome la TJO-grupo „La Kukolo” el Hilversum partoprenos en la vesperprogramo je la 3-a de Septembro kaj en la deklamprogramo je la 17-a de septembro. Ĉio en la kadro de la ekspozicio.



DENASKA ESPERANTISTARO-RUBRIKO.

„..... Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptas ĝin kiel sian lingvon

familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj sensignifa popoloeto havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzas eĉ milionoj da homoj.” D-ro Zamenhof (15-5-1901).

La celo de Denaska Esperantistaro estas formi tian popoleon. Gepatroj-Esperantistoj, helpu en tio! Faru provon, raportu pri viaj spertoj, kaj vi faros gravan servon al la Esperanto-Movado. Aligu viajn infanojn al Denaska Esperantistaro! Gepatroj, kiuj jam faris tion: ne forgesu pagi la kotizon! Por infanoj ĝis 6 jaroj: 0,50 guld. (1 ŝ), ĝis 14 j. 1.— guld. (2 ŝil.) (inkluzive de la 8-p. eldono de La Juna Vivo); por pli aĝaj 2,50 guld., (5 ŝil) inkluzive de LJV 16-p.

Kelkaj novaj anetoj: Randi Roose, J. M. Sabbestr. 12, Brugge, (Belgujo); Basia Sygnarska (nask. 1/VIII '48), ul. Friedleina 3 m 5, Krakovo, Polujo; Stephan Clive Mac. Gill (nask. 5/10 '48), Wyndham Rd., Pinehaven, Heretaunga, Wellington, Nov Zelando, Aŭstralio.

SKOLTA RUBRIKO.



Britujo: Laŭ informoj el Londono proksimume mil britaj roverskoltoj partoprenos la tutmondan kunvenon de roverskoltoj en Svedujo.

Italujo: La centra komisaro de la itala skolta katolika asocio decidis, okaze de la kunveno de la Ĝenerala Konsilantaro, je la 1-a de novembro 1948, akcepti ankaŭ Esperanton inter la fremdaj lingvoj, kiujn la italaj skoltoj devas paroli por akiri la ateston de tradukisto.

Nederlando: De la 16-a ĝis la 23-a de julio okazos internacia tendaro por kriplaj skoltoj en Lunteren. La partopreno kostos 10 anglajn funtojn kaj dek ŝil. La tendaron rajtas partopreni ĉiuj kriplaj, blindaj, surdaj aŭ mutaj skoltoj (14-j. aŭ pli aĝaj) kondiĉe ke ili estu skoltoj duaklasaj kaj dormis almenaŭ trifoje en tendo.

Skoltoj el Latvujo: Dispelitaj tra la tuta mondo nun troviĝas proksimume 4600 skoltoj el unu lando: Latvujo. Ili venis el lando, kiu kuŝas apud Baltika Maro, sudoriente de Svedujo kaj sude de Finnlando. Tiuj skoltoj ekziliĝis. La latva skoltismo komenciĝis en 1917 kaj en la jaro 1920-a la Internacia Oficejo akceptis la

latvajn skoltojn. Antaŭ la milito estis proksimume dekmil skoltoj en Latvujo. Kvar naciaj ĵamboreoj okazis kaj ilin partoprenis skoltoj el dek kvar landoj.

Dum la milito la skoltismo estis malpermesita en Latvujo kaj nun ĝi ankoraŭ estas malpermesita. Ekzilitaj latvaj skoltoj ĉefe troviĝas en Britujo, Germanujo, Aŭstralio kaj Kanado. Nun oficiale ekzistas 112 latvaj grupoj, kiuj enhavas 4600 skoltojn.

Zigzaganta Hipopotamo.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

Enketo pri Internacia Helplingvo, eld. de Sveda Esp. Federacio, sekve de peto de UEA en la 33-a Kongreso en Malmö. La raporto pretiĝis en la somero de '48 kaj en marto '49 la S.E.F. ĝin eldonis en 32-p. libreto. Ĝi estas tre valora dokumento, kiu multe povas helpi en la propagando por nia lingvo. Prezo 5 respondkuponoj. Mendojn akceptas Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacka, Stockholm, Svedujo.

Jarlibro de U.E.A. 1949 — Unua parto. Ne aĉetebla, ricevebla nur de individuaj membroj de UEA (Aliĝiloj haveblaj ĉe UEA, Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo).

Faŭsto-I, de Goethe, trad. de N. Bartelmes, 2-a revizita eld.; 190 p., tute bindita; prezo 6,75 guld. (\$ 2,40). Eld. Siegfried Ziegler, Eldonejo, München-Pasing, Germanujo. — Ekster Germanujo nur SAT en Parizo liveras la verkon.

Komentario al Faŭsto-I, de M. Butin, trad. de N. Bartelmes; 18-p. broŝuro; prezo 0,85 guld.

Konciza raporto pri la Esperanto-Film-Grupo. Montriĝis, ke la grupo aktive laboris: la membroj tradukis 19 tekstarojn. Oni multe propagandis per cirkuleroj kaj anoncoj, sekve de kio la vendo de filmstrioj jam triobliĝis. La financa bazo estas sana. Novaj grupoj estas starigotaj. En Septembro aperos nova prospekto.

Petu informojn ĉe EFG, Antw.str. 45, Bergen op Zoom, Nederlando.

Internacia Turisma Servo. Por gvidado, ĉiuranga hotelo, senkostaj turistaj prospektoj esperantaj kaj nacilingvaj, reciproka gastigado, luado de aŭtobusoj, ktp. turnu vin al la prizorganto de Turisma Servo, Kuniklojparkoj (Konijnperken 109), Bosvoorde, Brussel, Belgujo.

La Mondkongreso de la demokrata junularo, okazonta en aŭgusto en Budapeŝto, tiris la atenton de multmiloj da junuloj. Kelkcentoj el ili skribis en Esperanto al la organizantaro: MINZ, BUDAPEŝTO VIII, Muzeum u 11, petante informojn. Tio bonege impresis. Oni dungis Esperanto-interpretiston, decidante uzi E-ton oficiale apud aliaj lingvoj. Grave nun estas, ke ankaŭ multaj esperantistoj partoprenos la feston kaj kunportos esp.-flagojn!

Ankaŭ vi skribu al la Mondjunulara „Festival“-Komitato, Budapeŝto, Dózsa György ut 84/b.

P. B.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Bulgarujo: Stefan Ĥr. Kosev, Rilska N. 4, Burgas, deziras interŝanĝi tute kompletajn seriojn da poŝtmarkoj.

Ĉeĥoslovakujo: Vlastimil Nekuda, 18-j., studento, Zbysov 283, u Brno, dez. kor. kun l.t.m., interŝ. pm.k.il.pk. Respondo garantiata:

Karel Hrdinka, 20-j. elektroteknikisto, Zahradnická 31, Litomerice, dez.kor. per let.k.ilustr. poŝtk. Respondo certa.

Franco: La „Verda Klubeto” en Parizo pardonpetas, ĉar ĝi ne povas respondi al la tro multaj korespondpetoj. Ĝi transdonis la neuzitajn adresojn al la korespondaj servoj de Franca Radio kaj GEE (Esperantistaj geinstruis-toj), aŭ al aliaj junulaj kluboj.

Germanujo: F-ino Marga Klingel, Nürnberg, Fürtherstr. 59, dez. kor.

Japanujo: 20 knaboj deziras junajn korespondantojn. Skribu al la profesoro: s-ro Rinzo Okumura, ĉe Ikuno-Kolegio, Ikuno, Osaka.

S-ro Naohiko Tonomura (15-j.), N-ro 1170 Mūkaiĉiba, Kūkaiĉiba, Kūra-ŝiki, Okajama, dez. kor. kun la tuta mondo. Kol. pm. kaj pk.

23-j. studento dez. kor. per let. aŭ il. poŝtkartoj. Adr.: S-ro Tanaka-Kazuo, Minami-Kaizoi, Usuki-Mati, Oita-ken.

Poiojuo: L. Dobrowski, 19-j. studento, serĉas korespondantojn en la tuta mondo. Adr.: Tarnow, ul. Moniuszki 8.

PROPAGANDU PER LA TJO-POSTPAPERO.

50 folioj kaj 50 kovertoj: 2,— guld.
50 kartoj: 0,75 guld.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ „LA JUNA VIVO”

aĉeteblaj de la jaroj: '34/'35, '35/'36 kaj '36/'37. Perfekta materialo por komenc- kaj daŭrigkursoj.

Prezo po 1.— guld.

Mendu ĉe la TJO-Libroservo, Voorhaven 80, Edam, Nederlando.

La TJO-Libro-Servo povas liveri al vi ĉiujn Esperanto-librojn. Mendante ĉe ni, vi subtenas la Internacian Junular-Laboron!

KURSGVIDANTOJ! Bonegan materialon vi trovas en la de J. Muusses, Purmerend, eldonitaj lernolibroj:

Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo” 0,50 gld.

Apartenanta vortlisto (speciale por nederlandanoj) 0,15 guld.

„Sub la Verda Standardo” (plena metodo, konsistanta el: Gvidilo (nur por la gvidanto) ... 2,50 gld.

„Laboriloj” I kaj II, po 0,90 ..

„Memorigilo” „ 0,50 ..

Mendu ĉe la TJO-Libroservo, Voorhaven 80, Edam, Nederlando.

Internacia FERIA Semajno, 24-30 Julio 1949, en Skövde, Svedujo. Tre interesa programo, belegaj ekskursoj. Kostoj por la tuta semajno nur 70.— sv. kr. Petu informojn ĉe „Nordeŭropa Instituto”, Postk. sk. 16, Skövde, Svedujo.